

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 9
SEPT. 1951

人民中國報道

EN TIU ĜI NUMERO:

Usonaj Spionoj Kondamnitaj
La Ĉinaj Volontuloj kaj la
Patrio
Granda Akvokonservejo en
Ŝihmantan Konstruita
Prezroj Stabilas en Ĉinio, Saltas
Tali-tamburo
en Usono
Nodo Malligita

Venka Nepre Apartenas al la Kontraŭimperiistaj Popoloj

—Komuna Deklaracio de la Demokrataj Partioj kaj Popolaj Organizoj en la 6a Datreveno de la Venka Tago de la Kontraŭ-Japania Milito—

Venas la sesa datreveno de la granda tago de venko en la Kontraŭ-Japania Milito. Ĉi tiu granda tago de venko estis la rezulto de ok jaroj da heroo lukto, sangverŝo kaj sinofero de la kontraŭ-Japania popolo de Ĉinio, la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj aliaj kontraŭ-Japaniaj armitaj fortoj de la popolo. Ĝi estis la rezulto de la intima unueco de la demokratiaj klasoj kaj demokratiaj partioj de Ĉinio kontraŭ imperiista invado kaj la reaktia politiko de Ĉiang Kaj-ŝek. Ĝi estis la rezulto de komuna lukto de la kontraŭ-faŝistaj popoloj de diversaj landoj tra la mondo en la Dua Mondmilito, kaj precipe de la malavara helpo donita de la heroo Sovetia Armeo por ekstermi la japanan banditaron Kuantung-armeo kaj devigi ĝin senprokraste submetiĝi.

La granda venko en la Kontraŭ-Japania Milito markis la finon de 100-jara malvenko de la ĉina popolo en la lukto kontraŭ imperiismo kaj metis la fundamenton por landskala venko en la Liberiga Milito de la Ĉina Popolo. Kvar jarojn post la venko en la Kontraŭ-Japania Milito, fondiĝis la granda Popola Respubliko de Ĉinio. Hodiaŭ, escepte Tajvan kiu ankoraŭ restas liberigota, la ĉina popolo de diversaj nacioj tra la lando celebras la 6an datrevenon de venko en la Kontraŭ-Japania Milito en vivo de sendependeco, libero kaj feliĉo. Kiel oni diras, "Trinkante akvon oni pensas pri la fonto," ni devas nun glori tributi al la armitaj fortoj kaj civilaj popolanoj kiuj heroe luktis en la Kontraŭ-Japania Milito kaj al la martiroj kiuj oferis siajn vivojn, al la komandantoj kaj batalantoj de la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo, al Prezidanto Maŭ Ze-tung, la granda gvidanto en la Kontraŭ-Japania Milito, al la kontraŭ-faŝistaj popoloj de diversaj landoj tra la mondo, kaj al la granda Sovetia Armeo kaj ĝia granda Ĉefkomandanto Generalissimo Stalin.

Kiam ili celebras la 6an datrevenon de la Tago de Venko en la Kontraŭ-Japania Milito, la ĉina popolo staras antaŭ nova kaj grava tasko de lukto. Post la Dua Mondmilito, Usona imperiismo provis superregi la tutan mondon kaj sklavigi la popolojn de la mondo, sekvante la paŝojn de la germanaj, japanaj kaj italaj faŝistoj. Ĝi kopias la malnovajn taktikojn de Japanio en la invado al Ĉinio kaj minacas la feliĉon kaj sekuron de la ĉina popolo.

En junio 1950, la Usona Registaro okupis ĉinan teritorion Tajvan per armitaj fortoj por ĝin uzi kiel bazon por plua invado kontraŭ Ĉinio kaj por efektiviĝo de subfosaj agoj en Ĉinio. Samtempe, la Usona Registaro entreprenis grandskalan atakon al la Korea Demokrata Popola Respubliko, la amika najbaro de Ĉinio. Ĝia celo estas evidente prepari atakon al la ĉefa tero de Ĉinio. De tiam, la Usona aera forto ripetis faris atakojn kaj malordojn en la Nordoriento kaj lokoj laŭlonge de la marbordo de Ĉinio. Utiligante sian kontrolan pozicion super Japanio, la Usona Registaro subpremas la japanan popolon, liberigas japanajn militkrimulojn, rearmigas Japanion kaj provas direkti la japanajn invadajn elementojn denove al invadaj aventuroj kontraŭ Ĉinio kaj aliaj Aziaj landoj. Komplete ignorante la grandan kontribuon de Ĉinio en la Kontraŭ-Japania Milito kaj nian justan proponon koncerne pacon kun Japanio kaj komplete malob-servante ĉiujn internaciajn kontraktojn faritajn dum la Dua Mondmilito, nun la Usona Registaro kaj ĝia sekvanto la Brita Registaro kunvokas en San-Francisko packonferencon kun Japanio kiu ekskludas Ĉinion kaj preparas aprobi pactraktaton kun Japanio kiu malutilas al rajtoj kaj interesoj de Ĉinio kaj minacas pacon en la Ekstrema Oriento. Ĉio ĉi montras ke Usona imperiismo uzas ĉiujn rimedojn, rektajn kaj malrektajn, por provi efektiviĝi sian malnoblan kaj malician celon detrui nian grandan Ĉinan Popolan Respublikon kaj ŝanĝi Ĉinion denove en kolonion.

La popolo tra la tuta Ĉinio devas lukti decideme ĝis la fino por frakasi la agresajn planojn de la Usonaj imperiistoj. El ĉiuj luktoj de la nuna tempo, subteni la Korean Popolan Armeon kaj la ĉinajn popolajn volontulojn en ilia justa milito kontraŭ invado havas la plej grandan signifon. Nur per venko kontraŭ invado en Koreio fare de Usono kaj ĝiaj satelitaj landoj ni povas gardi la sekuron de la patrolando, malebligi refojan invadon de japanio, liberigi Tajvan kaj konservi pacon en la Ekstrema Oriento. Tial niaj samlandanoj tra tuta Ĉinio devas direkti ĉiujn siajn pensojn por fari kune kun la korea popolo daŭran lukton por la venka fino de la korea milito kontraŭ invado kaj devas juri ne ĉesi ĝis ĉi tiu celo efektiviĝos.

La helpo de la ĉina popolo al Koreio kontraŭ invado ja estis por la celo serĉi justan kaj pacan solvon de la korea problemo. En junio 1951, la Usona flanko esprimis sian volontecon konduki armisticiajn intertraktadojn en Koreio, post la propono farita de Jakobo Malik, Sovetia delegito al la Unuigitaj Nacioj, kaj tiel tiuj ĉi intertraktadoj daŭras ekde la 10a de junio ĉijare. Tamen, dum preskaŭ du monatoj, la Usona flanko montris ĉiujn arogantecon kaj senraciecon. Plue, en la 22a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro, ĝi dufoje sendis sian aeroplanon ĵeti bombojn sur Kajsung por murdi niajn delegitojn kaj tiel detrui la armisticiajn intertraktadojn.

La demokratiaj partioj kaj popolaj organizoj de Ĉinio ĉi tie unuanime deklaras, ke ni kun nia tuta forto decideme subtenas la seriozan kaj justan sintenon prenitan de la Delegacio de la Korea Popola Armeo kaj ĉinaj popolaj volontuloj en la intertraktadoj kaj kondamnas la arogantecon kaj malestimindajn krueleĝojn de la Usonaj murdistoj. Se nur la Usona flanko ne ŝanĝas sian sintenon, do ĝi devas porti la tutan respondecon de la malsukceso de la intertraktadoj kaj ĝiaj konsekvencoj.

Koncerne la projekton de Pactraktato kun Japanio publikigita de la Usona kaj Brita Registaroj kaj la San-Franciska Konferenco kunvokita de la Usona Registaro, s-ro Ĉou En-laj Ministro de la Ministerio de Fremdlandaj Aferoj de la Centra Popola Registaro de Ĉinio jam faris deklaron en la 15a de aŭgusto kiu klarigis la sintenon de Ĉinio. La demokratiaj partioj kaj popolaj organizoj de Ĉinio unuanime subtenas la deklaron de Ministro Ĉou En-laj. En la nomo de la popolo tra la tuta lando, la diversaj demokratiaj partioj kaj popolaj organizoj de Ĉinio deklaras ke ili ĉiam advokatis senprokratan finon de la stato de milito inter la diversaj landoj kaj Japanio kaj la kontrakton de ĉiufanka pactraktato kun Japanio por starigi novajn rilatojn de paco kaj amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. Sed ni neniam rekonos iun ajn japanan pactraktaton en kiu la Ĉina Popola Respubliko ne partoprenis en la preparado, projektado kaj subskribado. Ni bonvenigas la sintenon prenitan de Sovetunio kaj Hindio, Birmo kaj ĉiuj pacamaj popoloj tra la tuta mondo por kontraŭbatali la Usona-Britan Projekton de Pactraktato kun Japanio.

La demokratiaj partioj kaj popolaj organizoj volas emfazi ke la tuta aspekto de la popoloj de Azio ŝanĝiĝis kaj ŝanĝiĝas pro la venko en la Kontraŭ-Japania Milito kaj la sekvinta venko en la Ĉina Popola Liberiga Milito, la kontrakto de la granda Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo inter la Ĉina Popola Respubliko kaj Sovetunio, la venko de la ĉina popolo en la lukto rezisti Usonon kaj helpi Koreion, kaj la nova kontraŭimperiista alta tajdo de la diversaj Aziaj popoloj kaŭzita de la Usona-Brita unufanka pactraktato kun Japanio. La epoko de imperiista regado fundamentamente finiĝis. La Aziaj popoloj, kiuj konsistigas pli ol

daŭrigota sur p. 70



La imperiisto izoligas

Usonaj Spionoj Kondamnitaj

Sep spionoj de diversaj nacioj, ĉiuj laborintaj por la Usona Registaro, jam estas kondamnitaj de la Tribunalo de la Militkontrola Komitato de Pekino post esplorado kaj juĝaj procesoj. Du el ili estas kondamnitaj al morto, kaj la ceteraj, al 4-jara ĝis dumviva malliberigo laŭ anonco de la Militkontrola Komitato de Pekino je la 17a de aŭgusto.

Ili kulpas en serioj da diversgradaj krimoj laŭ la akuzo prezentita antaŭ la tribunalo de la Popola Prokurora Oficejo de Pekino. Tiuj krimoj inkluzivas priĉason de sekretaj informoj pri militaj, ekonomiaj kaj politikaj aferoj, kaj liveron de tiuj informoj al la Oficejo de Strategia Servo de Usono, la Okupa Ĉefstabo de Usono en Tokio aŭ la Oficejo de la Milita Ataseo de la antaŭa Usona Ambasadoro en Pekino, kaj kaŝon de municio por armita ribelo kaj konspiro atenci la vivojn de gvidantoj de la Centra Popola Registaro de Ĉinio.

Ili ĉiuj estas personoj kun mult-jara kariero de spionado, sabotado aŭ kontrabando de municio en Ĉinio longe antaŭ la liberigo de Pekino. Laŭ iliaj propraj konfeso, korespondaj, kaj ankaŭ iliaj subskribitaj atestoj kaj la protokoloj de esplorado, ili sin vendadis preskaŭ al ĉia ajn spiona servo. Kiam la Usona Registaro transprenis sur sin la rolon de la unua agresa imperiisto en la mondo, ĉiuj ĉi sekretaj agentoj ankaŭ kolektiĝis sub ĝia direkto kiel aliaj faŝistaj restaĵoj de Hitler, Musolini, Hirohito kaj aliaj.

Iu David Dean Barrett, kolonelo en Usona Armeo, Milita Ataseo de la antaŭa Usona Ambasadoro en Pekino, ludis gvidan rolon en la krimoj laŭ la malkaŝitaj atestoj. Estis li, kiu dungis kaj pagis tiujn ulojn, donis al ili la instrukciojn kaj estis li, al kiu la spionoj liveris siajn informojn.

Tiu ĉi 58-jara agento imperiista venis de Central City, Colorado, kaj ekloĝis en Ĉinio jam en la jaro 1922. Post studado en lingva lernejo en Pekino li komencis labori en la Oficejo de Milita Ataseo kaj poste estis resendita al Usono por speciala trejnado. Li parolas flue la ĉinan lingvon kaj pensas sur sin diversajn laborojn por la spiona servo de

Usona Armeo en diversaj partoj de Ĉinio inkluzive de Kunming (昆明), Kulin (桂林), Birma Aŭtovojo kaj Nordorienta Ĉinio (東北). Li gvidis la t.n. Usonan Observan Grupon, kiu venis al Jen-an (延安) kiam Usono estis ankoraŭ batalanta kontraŭ Japanio. Li daŭrigis sian agadon post la liberigo de Pekino utiligante siajn kontaktojn por akiri sekretajn informojn ĝis kiam li forlasis Ĉinion en aprilo, 1950. Antaŭ sia foriro li klopodis triki spionan reton kaj la sep krimuloj envolvitaj en tiu ĉi proceso estas parto de lia organizo. Kvankam li mem ankoraŭ ne estas sub juĝado, tamen tiu ĉi Kolonelo Barrett montrigas kiel ĉefkrimulo en la proceso. Usona imperiismo estis preta utiligi ĉiujn ajn, inkluzive de naziistoj, faŝistoj de Musolini kaj katolikaj pastroj, por daŭrigi sian subfosadon kontraŭ la popolo de Ĉinio.

Sube estas karieroj de la sep krimuloj:


1. **Antonio Riva**, italo, 55-jara, agento en Pekino de la Kompanio de James Walter kaj Filoj en Tien-zin, diplomito de la Reĝa Aeronautika Akademio, Caserta, Italio, antaŭe sekreta agento kaj spiono de la Itala Faŝista Partio, la Ĉiang-Kaj-ŝeka bando kaj Japanio, estis organizanto kaj ĉefo de la Pekina filio de la Faŝista Partio. La akuzo kontraŭ li estis spionado, kaŝo de municio inkluzive de tranĉea bombardilo kaj ankaŭ konspiro kun alia Usona sekreta agento kaj spiono, la japano Riniĉi Jamaguĉi, bombardi la estradon de la Pordego Tien-an dum la ceremonio de la Ĉina Nacia Tago je la 1-a de oktobro, 1950, intencante atenci la vivojn de la Prezidanto kaj aliaj gvidantoj de la Centra Popola Registaro.

2. **Riniĉi Jamaguĉi**, kiu ankaŭ nomiĝis angle Frank, france Francois Antoine kaj

ĉine Liu I, japano, 47-jara, redaktanto de la ĉina indekso de la Franca Librejo en Pekino, historio - diplomito de la Imperia Universitato en Kioto, Japanio, ekde 1938 sekreta agento kaj spiono por Japanio kaj poste por Usono, desegnis la planon por bombardi la estradon de la Pordego Tien-an per 60-milimetra tranĉea bombardilo de Tokes-tipo kaj sendis la planon al la Okupa Ĉefstabo de Usono en Tokio por aprobo.

Ambaŭ Antonio Riva kaj Riniĉi Jamaguĉi estis kondamnitaj al morto.

3. **Tarciscio Martina**, italo, 64-jara, diplomito de la Vatikana Monaĥejo, Romo, veninta al Ĉinio en januaro de 1926 kiel episkopo de la Katolika Paroĥo de Ji-Gubernio (易縣) en Hopej-Provincio, delegito en Pekino de Arkiepiskopo Antonius Riberi, la Internuncio de la antaŭa t.n. Diplomatia Misiono de Vatikano en Ĉinio, ekde 1947 estis spiono



Antonio Riva, la Usona spiono, en sia domo kun la tranĉea bombardilo per kiu li volis bombardi la estradon sur Pordego Tien-an.

por Japanio, la bando de Ĉiang Kaj-ŝek kaj la Usona Registaro, kunlaboris kun la Kuomintanga armeo kaj organizis armitajn civil-vestajn taĉmentojn por ataki la liberigitajn regionojn, kaŝis armilojn kaj municiojn inkluzive de kugloj de tranĉea bombardilo kaj 259 kartoĉoj por fusilo kaj pistolo, ok mangrenadoj por Riva kaj aliaj agentoj en Pekino, kolektadis sekretajn informojn. La puno por li estas dumviva malliberigo.

4. **Henri Vetch**, franco, 52-jara, diplomito de la Akademio de Artilerio, Fontainebleau, Francio, veninta al Ĉinio en 1929, administranto de la Franca Librejo en Pekino ekde 1941, spionadis por Usona spiona organizo, provizis kaŝejon al Usona sekreta agento kaj spiono Riniĉi Jamaguĉi. Li estis kondamnita al 10-jara malliberigo.

5. **Quirino Victor Lucy Gerli**, italo, 56-jara, administranto de la Kompanio Italiasia, aliĝinta al la Itala Faŝista Partio en 1929, laboris kiel spiono por Japanio ekde 1943, kaj post la kapitulaco de Japanio, kiel sekreta agento por Barrett kaj aliaj Usonaj agentoj. Li estis kondamnita al 6-jara malliberigo.

6. **Walter Genthner**, germano, 39-jara, agento en Pekino de la Limigita Kompanio de Robert Bosch en Stuttgart, Germanio, nazisto kiu laboris kiel spiono por la Usonaj trupoj en 1945 kiam ili estis en Pekino, poste en 1949 kiel teknikisto en la antaŭa Usona Konsulejo kaj pli poste kolektis sekretajn informojn por Riva kaj Barrett. La kondamno al li estas 5-jara malliberigado.

7. **Ma ŝin-ĝing**, (馬新清), ĉino, 31-jara, helpis al Gerli en lia spiona laboro kaj sub lia direkto kolektis militajn kaj politikajn informojn. Li estis kondamnita al 9-jara malliberigo kaj senigo de politikaj rajtoj por 15 jaroj.

La agadoj de tiuj ĉi krimuloj estis komplete malkaŝitaj post kiam Vetch kaj Martina estis arestitaj je la 11-a de marto kaj la 12a de majo, 1951 respektive, tamen la aŭtoritatoj de publika sekuro informiĝis pri la plano bombardi la estradon de la Pordego Tien-an jam longe antaŭ kiam la krimuloj havis ŝancon por ĝin efektiviĝi, kaj Riva, Jamaguĉi kaj la tri aliaj estis arestitaj je la 26a de septembro, 1950. Amaso da atestoj estis kolektitaj dum monatoj kaj kiam la akuzitoj staris kontraŭ tio dum la proceso, ili fine konfesis pri diversaj krimoj kontraŭ la Popola Respubliko de Ĉinio.

Laŭlum

Dear Tony,
Please give my kindest love to my place on Mt. Rainier.
Waiting for Harry & Dorothy at 12:15 for lunch. My class
has cancelled on Tuesday for the time being.
My telephone please to contact me if I have time and trouble
of the evening time a separate letter.
I am nervous about your coming classified material to me by
mail. Do you think that is O.K. Our letter takes four days
they might want a return of checks for us soon.
The staff is well and all and I am glad to have it.
Sincerely,
Dave

Dear Mrs. Catherine de
embroidered dress

Maldekstre: Letero de David Dean Barrett, al Antonio Riva.
Malsupre: Skizo de Pordego Tien-an montranta la celon de bombardado desegnita de Riniĉi Jamaguĉi.

Venko Nepre Apartenas al . . . (daŭrigo)

duonon de la tuta homaro, uzas sian superegan forton en sankta batalo por renversi imperiistan subpremon. Ja estas neeble por la Usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj provi reen turni la radon de historio. Venko nepre apartenas al la kontraŭimperiistaj popoloj de Ĉinio, Azio kaj la mondo.

Vivu la naciaj herooj en la Kontraŭ-Japania Milito!

Vivu la venko en la Kontraŭ-Japania Milito kaj la Popola Liberiga Milito!

Vivu la venko de la Korea Milito kontraŭ Invado!

Vivu la granda unueco de la ĉina popolo en la batalo kontraŭ imperiismo!

Vivu la granda unueco de la Aziaj popoloj en la batalo kontraŭ imperiismo!

Vivu la granda unueco de la popoloj de la mondo en la batalo kontraŭ imperiismo!

Vivu Sovetunio, la fidela aliancano de la ĉina kaj Aziaj popoloj!

Vivo Generalismo Stalin, la standardo-portanto de daŭra mondpaco!

Vivu la Ĉina Popola Respubliko!

Vivu Prezidanto Maŭ Ze-tung!

Subskriboj de la Landa Komitato de la Politika Konsiliga Konferenco de la Ĉina Popolo, la Ĉina Komunista Partio, la Revolucia Komitato de la Ĉina Kuomintang, la Ĉina Demokrata

Ligo, la Ĉina Demokrata Landkonstrua Asocio, la senpartiaj demokratroj de la Politika Konsiliga Konferenco de la Ĉina Popolo, la Ĉina Asocio por Akceli Demokracion, la Ĉina Kamparana kaj Laborista Demokrata Partio, la Ĉina Ĉihkungtang, la Ĉiusan-Societo, la Tajvana Ligo de Demokrata Aŭtonomio, la Ĉina Novdemokratia Junula Ligo, la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Virinoj, la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Junuloj, la Tutĉinia Federacio de Studentoj, la Tutĉinia Federacio de Literaturaj kaj Belartaj Rondoĵoj, la Tutĉinia Federacio de Natursciencaj Societoj.

La 3a de Septembro, 1951.

La Ĉinaj Volontuloj kaj la Patrio

Fang Ki (方紀)

Inter la ĉinaj volontuloj sur la fronto en Koreio, la plej furora kaj kara vorto estas "patrio." Kiam oni parolas tiun ĉi vorton, liaj okuloj ekbrilas kaj liaj korpo kaj menso tute trempigas en gloro kaj fiereco. Ĝin parolante oni ekpripensas siajn tutan vivon kaj gekarulojn kaj la idealon pri la estonta feliĉo. Patrio, por la ĉinaj volontuloj ĝi estas la fonto de saĝo kaj bravo, la neelĉerpebla forto por venki la malamikojn; ĝi estas la alta celo, por kiu la ĉinaj volontuloj batalas kaj glore dediĉas siajn sangon kaj vivon. Koncentriĝas sur tiu ĉi granda vorto ĉiuj pensoj kaj agoj de la ĉinaj volontuloj. Ĉio por la patrio—ĝi estas la plej alta honoro.

Sur la fronto en Koreio mi renkontis jenan okazon:

Tun fojon, kiam ni ĵus alvenis Koreion, ĉe tagiĝo aŭtomobilo portis nin apud la stadion de iu trupo de ĉinaj volontuloj. Ĉe la vojkruco staris multaj homoj. Vidinte la standardon flirtantan sur nia aŭtomobilo, ili ĉiuj alpremiĝis ĉirkaŭe kaj kriis: "Ĉu estas venintoj el la patrio?"

Ne atendante la halton de la aŭtomobilo kelkaj jam suprenrampis sur ĝin kaj manpremis kun ni, mallalŭte dirante kun entuziasmo: "Kiom longe ni vin atendis!"

Inter tiuj batalantoj estis junulo, nomata Lin Ĉih-hoŭ (林志厚). Li estas 19-jara, nordorientano, kaj vicestro de la telefon-pelotono. Kvazaŭ, longtempe hejmon forlasinta infano revidus sian patrinon, li tiel ĝojas nin vidi kaj silente helpis nin labori. Ĉe nia adiaŭo ni demandis lin: "Ĉu vi ion deziras de la patrio?" Li honteme ridis kaj silentis, direktante sian rigardon al la memoriga insigno por la unua datreveno de la fondaĵo de la Ĉina Popola Respubliko, kiun portis kamaradino el nia Delegacio sur sia brusto. La insigno estas freŝruĝa nacia standardo sur kiu bareliefas ora portreto de Prezidanto Maŭ.

La kamaradino ekkomprenis, kaj ridante fratetis lian ŝultrom—"Mi ĝin donacas al vi, knabo."

Ŝi tuj deprenis de si la insignon kaj ĝin pendigis sur la bruston de Lin Ĉih-hoŭ. Lin tamen ruĝiĝis. Li klinis sian kapon kaj rigardis la insignon brilantan sur lia brusto. Li estis tiel ekscitita, ke li premis sian bruston per la manoj kaj diris preskaŭ spiregante: "Ĉu mi meritas? Ĉu mi meritas?"

Poste li rakontis al ni pri sia amo kun la insigno. Li diris: Kiam li aŭdis ke la Ĉina Popola Delegacio venos el la patrio, li jam ekpensis: la patrio sendos viziti nin kun multe da donacoj. Kion mi do deziras? Li interŝanĝis siajn opiniojn kun siaj kamaradoj pri tio. Kelkaj deziras fumi cigaredojn de la patrio; aliaj deziras manĝi la enladigitajn frandaĵojn de la patrio; bonaj lernantoj deziras fontoplumojn; kadroj deziras horloĝojn por kalkuli la tempon; kaj iuj aliaj deziras ludkartojn por pasigi la tempon en la tranĉeo... Sed ĉiuj tiuj ne estis dezirataj de Lin Ĉih-hoŭ. Li deziras tiom malgrandan objekton, kiun portante sur la brusto li kvazaŭ estus kun la tuta patrio, kaj kiun vidante oni lin envidus kaj li mem ankaŭ sentus

gloron, kio povus plialtigi lian bravecon por venki la malamikojn.

Kaj unuavide li ekamis la insignon. Li diris: "Kelkajn tagojn mi pripensadis. Mi pensis: Ĉu mi povus havi unu? Ĉu mi devus? Kaj ĉu mi meritas? Ĝin portas nur la herooj kaj merituloj, kiuj faris gloron por la patrio. Kaj mi? Mi nur volonte venis al Koreio por batali..."

Nia kamaradino ekridis kaj diris prenante lian manon: "Ĉiu ĉina volontulo estas meritulo de la patrio kaj heroo de la popolo. Vi ĝin portu!"

Tamen Lin Ĉih-hoŭ skuis la kapon, deprenis la insignon, zorgeme ĝin envolvis en paperon kaj enpoŝigis.



Oficero kaj batalantoj de la ĉinaj popoloj volontuloj ĵuras venĝon por la korea kaj ĉina popoloj kontraŭ Usonaj invadantoj

Li diris serioze: "Ne, kamaradino, mi portos ĝin post kiam mi faros gloron por la patrio."

Pri la koncepto de la ĉinaj volontuloj pri la patrio oni rakontis al mi belan historieton—

Pro taktika neceso, iu pelotono de ĉinaj volontuloj devis translokiĝi de sia batalpozicio. Kiam ili malsupreniris la monton, ĝuglo de malamika maŝinpaŝilo paffaligis la kepon de batalanto.

Kelkajn paŝojn irinte la batalanto ektrovis ke lia kepo malaperis. Li tuj tion sciigis al la pelotonestro: "Mi perdis mian kepon!"

Pro la urĝeco de la batalotasko, la pelotonestro respondis ke li portempe iru sen kepo kaj ĝin lasu.

"He," diris la batalanto: "Kial ĝin lasu? Mi ja ne malvenkis! Ĉu ne estus por la patrio honto ke mi perdis la kaskon kaj kirason*?"

Li ricevis permeson kaj rerampis al la malnova batalpozicio.

La malamikoj jam alsturmis kaj li povis jam vidi iliajn vizaĝojn. Li forte ekkriis: "Ne rabu mian kepon!" kaj elĵetis grenadon. La malamikoj retrokuris. Sed iliaj kanonoj kaj maŝinpaŝiloj bombardis kaj pafadis sur la monton. Fine,

sub tiom furioza bombardo, li tamen retrovis sian kepon.

Kun fiero li remalsuprenkuris kaj atingis sian pelotonon. Regulece portante la kepon sur sia kapo, li alrenkontis la pelotonestron, respektive lin salutis, kaj diris: "Pelotonestro, vidu, nur nun mi aspektas kiel ĉina popola volontulo!"

En la koncepto de la ĉinaj volontuloj, la patrio estas tiel majesta, sankta, kaj konkreta. Eĉ malgranda afero povas sentigi ilin pri ĝi, precipe dum malfacilaj horoj.

En novembro de la pasinta jaro, kiam la ĉinaj volontuloj forlasis sian patrion, iu batalanto kunportis botelon da akvo. Sed ĉar li ĝin envolvis en sian tornistran kaj bataladis marŝante, li forgesis ĝin trinki.

Iufoje, li kun sia pelotono gardis sur monto, kaj forbatis tri fojojn la sturmon de la malamikoj. Antaŭ sia kvara sturmo, la malamikoj kutime bombardis la batalpozicion de la volontuloj, kiuj trankvile sin kaŝis en la tranĉeo kaj kalkulante la malamikajn obusojn, pretiĝis al reatko. Nun la batalanto kiu kunportis akvon, eksentegis soifon. Sed li tute forgesis ke akvo estas kun li, ĉar deŝt li forlasis la patrion, sian tornistran li neniam malfervis. Li alparolis sian najbaran kamaradon: "Ĉu vi soifas? Kiom bone, se estas iom da akvo!"

Tiu kamarado movetis siajn lipojn, kaj tuj ankaŭ netole-reble soifis.

Subite, obuso renversis arbon antaŭ la ĉinajn volontulojn. La batalanto eletendis sian langon por leki la rosojn sur la arbofolioj. Tamen de la obuseksplodo la terpolvo plensprucis sur la arbofoliojn, kaj li manĝis buŝon da koto.

Li ĝin ekraĉis, nenion dirante.

Post momento li trovis antaŭ si glatan kaj rondan ŝtoneton, kaj senintence ĝin prenis, enlangante en la buŝon kaj turnadis ĝin per la lango. Aŭdinte la sonon lia najbara kamarado lin demandis: "Kion vi manĝas?"

"Ŝtonon," li respondis: "Ŝtono ankaŭ povas kvietigi la soifon. Vi provu. Ĝin tenante en la buŝo, vi povas iom plimultiĝi la salivon."

Tiu metodo tuj diskonigis tra la tuta pelotono, kaj ĉiuj ekmanĝis klake ŝtonetojn. Sed pli kaj pli oni sentis malagrablon en la buŝo.

La despli furiozanta bombardo de la malamikoj antaŭsciigis ke ilia alsturmo baldaŭ komenciĝos. La ĉinaj volontuloj saltadis en la kavoj faritaj de la malamikaj obusoj. Ĝuste nun alflugis obuseco kaj ŝirtranĉis la tornistran de la batalanto kiu kunportis akvon en ĝi. Pon! la akvobotelo elmontriĝis. Komence la batalanto pensis ke li vundiĝis, sed kiam li palpis per sia mano, li tuŝis la akvobotelon. Kun ekstazo li laŭte ekkriis: "Kamaradoj, jen akvo, el la patrio!..."

Li tuj rampis al la pelotonestro kaj donis la akvobotelon al li. La pelotonestro ne volis ĝin trinki kaj volonte ĝin transdonis al sia najbara maŝinpaŝisto. Sed kiam tiu ĉi ekprenis la akvobotelon, ĉesis la

bombardo, kaj la malamikoj suprensturmis. Metinte la akvobotelon apud sin, li ekpreparis la maŝinpaŝilon kaj pafadis al la malamikoj. Ekkriis la pelotonestro: "Antaŭen, pro la akvo de la patrio!"

Ĉiuj batalantoj ekelsaltis kaj laŭte kriis unuvoĉe: "Pro la akvo de la patrio..." Amason da grenadoj ili malsuprenjetis kaj etendis la bajonetojn kaj sturmis al la malamikoj...

Memkompreneble, pri la patrio la batalantoj pensas ne nur de la antaŭokulaj okazintaĵoj; ili pensas tre multe kaj ĝis tre malproksime. Mi scias, ke multaj ĉinaj volontuloj ŝatas vidi la fotojn "Pri nia granda patrio" sur la Popola Tagĵurnalo. Kiam estas eble, ili detranĉas ilin kaj gluas sur siajn taglibrojn. Mi vidis taglibron de iu batalanto, sur kiu surgluigis foto de la manĝantaj infanoj de iu infanvartejo en Pekino, kaj sub la foto nete skribiĝis per fontoplumo la vortoj: "Karaj infanoj, vi bone fartas. Por ke vi vivu pli bone, ni nepre ekstermos la imperiistojn!"

La sentoj de la batalantoj pri la patrio estas tiel sinceraj kaj delikataj, ke kelkfoje, kiam ili ne povas esti elesprimitaj, ili kristaliĝas en tutecon de entuziasmo, kaj la patrio fariĝas homo konkreta en la koncepto de la batalantoj.

Iu batalanto skribis jen sur la koverto de sia letero kiun li petis la Ĉinan Popolan Delegacion kunporti al la patrio:

Sendis la Maŝinpaŝila Pelotono de la Tria Roto de Volontula Trupo

Al La Granda Ĉina Popola Respubliko

En la nokto de la 22-a de aprilo kiam komenciĝis la 5-a batalago, ne malproksime de la batalfronto ni revenis de salutkunveno por la volontuloj. Survoje, jam sufiĉe malproksime de la kunvenejo, ni aŭdis vokon malantaŭ ni: "Kamaradoj, atendu momenton..."

Ni haltis, kaj plene armita batalanto spiregante nin alkuris. Rapide me li salutis nin kaj diris: "Kamaradoj, mi estas reprezentanto, sendita de nia roto—ĉar ili iris partopreni atakon, ili sendis min al la kunveno... Kiam mi reiros, mi faros raporton... kamaradoj."

Parolante li elpoŝigis malgrandan paketon, malvolvis la ŝtofon kaj poste olepaperon, kaj fine aperis ruĝa notlibreto.

"Kamaradoj, surskribu, eĉ unu frazo sufiĉus. Mi jam vidis la homojn de la patrio kaj aŭdis kion ili diris... Mi ja baldaŭ iros batali!"


Sub la lunlumo mi vidis lian vizaĝon, seriozan kaj sinceran. Mi estis tiel tuŝita ke mi ne scias kion diri. En lian karan notlibreton mi tuj skribis la jenajn vortojn:

"La popolo de la patrio dankas vin kaj tutforte subtenas vin, kiuj defendas ĝian sekurecon kaj feliĉon. Vivu la ĉinaj volontuloj!"

Tradukis Jungsen

* Perdi kaskon kaj kirason signifas en ĉina lingvo grandan fiaskon.

Granda Akvokonservejo en Ŝihmantan Konstruita



Unu angulo de la konstruado de Ŝihmantan-Akvokonservejo

La konstruado de Ŝihmantan-akvokonservejo (石漫灘水庫) sur la supra parto de Hung-Rivero (洪河), unu el la branĉoj de Huaj-Rivero (淮河), komenciĝis en aprilo, ĉijare kaj jam finiĝis sukcese en la komenco de julio. Ĝi estas la unua akvokonservejo kiu finkonstruiĝis en la batalo por subjugado de la Huaj-Rivero, kaj ankaŭ grava sukceso en la historio de akvokonserva konstruado en Ĉinio. El ĝi oni povas tiri sperton por la estonta konstruado ĉirilata en Nova Ĉinio. Tial la Honana Filio de la Direktejo por Subjugado de Huaj-Rivero okazigis grandegan kunvenon sur la laborkampo por celebri la sukceson kaj honori la eminentajn laborintojn en la konstruado.

La funkcio de la Ŝihmantan-akvokonservejo estas deteni kaj konservi la akvegon el la supra parto de Hung-Rivero, ke la torento veninta de la alta montaro kaj pasanta la krutan valon Ŝihmantan estos enkondukita en vastan valon ĉirkaŭitan de montoj kaj tie konserviĝinta. Per tio unufanke minimumigis la fluvolumenon en la meza kaj mal-supra partoj de Hung-Rivero kaj aliflanke la rezervata akvo povos esti utiligita en la irigacio, dum akvomanka periodo en la Huaj-Rivero.

Tiu ĉi akvokonservejo kapablas enteni 47,000,000 kubmetrojn da akvo kiu sufiĉas por akvumi 90,000 muojn da kampoj. La konstruado konsistis el tri ĉefaj partoj:

- 1) Konstrui trans la rivero unu digon, kiu longas je 450 metroj, altas je 22 metroj kaj interligas la montojn ĉe ambaŭ flankoj de la rivero.
- 2) Trabori la monton ĉe la dekstra fino de la digo por fari akvotunelon 85 metrojn longan kaj fiksi tie kluzon por kontroli la akvolumenon enlasotan.
- 3) Trahaki la monton ĉe la maldekstra fino de la digo por fari

Prezoj Stabilas...

daŭrigo de p. 73

prezo-vario kaj inflacio. La Usona Registaro pli kaj pli profunde enfosas en la malriĉajn poŝojn de la popolo. Ĝi altigas impostojn por ebligi sian frenezan armadon.

Tiu ĉi jaro de interveno en Koreio alportis mizeron al la popolamasoj en Usono sed samtempe alportis ne-takseblan riĉon al la Wall-strataj monopolistoj. Militarizado draste malpliigas la produkton de civilaj industrioj de Usono kaj nun kondukas al novaj ruinigaj krizoj en la ekonomio de Usono.

—Censinio

akvoelirejon 40 metrojn larĝan tiel ke oni povas elkondiĉi la nereteneblan akvon for de la akvokonservejo por sekurigi la digon, se la konservita akvo alproksimigas la supron de la digo.

Antaŭ la liberigo almenaŭ tri jaroj estis bezonataj por finkonstrui tian akvokonservejon. Kaj eĉ en nuna Ĉinio, se oni konsideras la mankojn de inĝenieroj kaj spertaj laboristoj, tia konstruado estas tute nebla sen la subteno de la tutlanda popolo kaj la kunlaboro inter la inĝenieroj, teknikaj laboristoj kaj kamparanaj laboristoj.

Pli ol cent inĝenieroj lukte laboris ĉe Ŝihmantan. 80% el ili estis studentoj de la universitatoj aŭ kolegioj de Orienta Ĉinio kaj Honan-Provinco. La ceteraj venis de la akvokonservaj institucioj de Orienta kaj Centro-Suda Ĉinio kaj de la Akvokonserva Komitato de la Flava Rivero. Plejparto de la teknikaj laboristoj venis el Norda Ĉinio, kie ili bone laboris en la konstruado de Paŭki-Tiansŭj-Fervojo (寶天鐵路). La divers-specaj transportiloj, teknikaj instrumentoj kaj materialoj estis alportataj el diversaj lokoj tra la tuta lando, kiel Ŝanhajo (上海), Nankino (南京), Hankoŭ (漢口), Ĉengĝeŭ (鄭州) kaj Hengĝiang (衡陽) kaj ceteraj urboj. Ĉio ĉi tio plene manifestis la grandan forton de la unueco de ĉina popolo.

La vojo laŭ kiu progresis la konstruado de la akvokonservejo estis ankaŭ la vojo sur kiu la teknikistoj kaj laboristoj senĉese lernis kaj konkeris la malfacilojn unu post la aliaj. La studentoj rigardis la laborkampon kiel lernejon. Ili ne nur faris sian ĉiutagan laboron sed ankaŭ organizis multajn studajn grupojn pri diversaj teknikoj, ekzemple pri tuneltraborado, pri digkonstruado, konstruo de akvoelirejo ktp. Per tio ili sukcese konkeris ĉiujn malfacilaĵojn. Ekzemple, en la motortaborado por fari akvoelirejon la laboristoj renkontis rokon de ruĝa kvarco. Ordinare per la pneŭtika drilo ili en ses minutoj povis fari unumetre profundan kavon por minado, sed ĉiokaze ili sukcesis trabori nur unu decimetron profundan kavon en la sama tempodaŭro. Tiam la inĝenieroj, laboristoj kaj studentoj tuj studis kune la problemon kaj fine ili trovis rimedon fini la traboradon de la akvoelirejo en 17 tagoj anstataŭ en unu monato laŭ la antaŭa plano.

Pro manko de teknikaj laboristoj la spertaj laboristoj krom sia propra laboro prenis sur sin ankaŭ respondecen trejni kamparanojn-laboristojn

El tio elbakiĝis amaso da teknikaj laboristoj. Ekzemple, en la komenco nur unu laboristo nomita Li Juĉin (李玉琴) scipovis kiel konstrui malpezan relvojon sed nun jam pli ol 300 kamparanaj laboristoj lertas en tiu laboro. Komence nur ses laboristoj kapablis manipuli pneŭtikan drilon, sed nun jam 38 kamparanaj laboristoj posedas tiun teknikon. Krome, multaj el la kamparanaj laboristoj lernis ankaŭ kiel miksi betonon, kiel fiksi elektrajn dratojn kaj lampojn kaj kiel funkciigi pum-pilojn.

En la laborkampo ne pli granda ol 1,200 kvadratmetroj laboris tut-tage 40,000 kamparanaj-laboristoj. Sur la montdeklivoj, ĉe la montpiedoj kaj en la valoj moviĝis amaso kaj amaso da homoj. Fortaj laboristoj kuris regule tien kaj reen portante plenkorbojn da teraĵoj. Starante sur la montdeklivo oni povis vidi torenton da ĉaroj rulantaj sur malpezaj ferreloj ĉirkaŭ la la-

borkampo. Ĉiu el la ĉaroj estis antaŭenpuŝataj de tri laboristoj alportante teraĵon je la distanco de 1,000 metroj al la digo kie flirtis ruĝaj flagoj. Tie la laboristoj malŝargis la ĉarojn aldonante teraĵon sur la digo kaj la malplena ĉaro pluen iris. Tra la tuta tago tiuj ĉaroj funkciis kvazaŭ turnata disko kaj neniam ĉesis.

La plej favoritaj por ĉiuj estas la kelkdek maŝinoj por fosado, transporto, ŝarĝo kaj malŝarĝo de la teraĵo. Ĉiu maŝino manipolata de unu persono, povas plenumi la laboron de 500 ĝis 800 homoj ĉiutage. Sur la digo funkciis ĉirkaŭ 10 platigiloj en longa vico kaj sub ili la teraĵo freŝe alportita farigis tuj solida, firma kaj nedisigebla parto de la digo.

La giganta konstruado de la akvokonservejo pliintense kulturis la amon de la liberigitaj kamparanoj al sia granda patrolando. La kamparanoj loĝantaj eĉ kelkdek liojn for de la laborkampo amase tien vizititis kvazaŭ tie okazus ia foiro.

I. K.

LA sono de la alarmsonorilo estis la heroldo de la Franca Revolucio kaj la ritma bato de la talitamburo estas la simbolo de la triumfo de la ĉina popolo.

Kiam la popolaj armeoj antaŭeniris de la kamparo por liberigi la urbojn, ili kunportis kun si la kuraĝajn, batalemajn kaj ekscitajn batojn de la talitamburoj. La tamburoj de la kamparanoj urbeciĝis. Naskiĝis nova nacia artformo por la festoj. Hodiaŭ la talitamburo, kun siaj akompanantaj cimbaloj kaj gajaj kostumoj, estas karakteriza esprimo de forteco, memfido kaj goĝo de la liberigita popolo. En la ĉijara Majtaga manifestacio en la ĉefurbo, sub la brilega sunlumo kaj inter flirtantaj ruĝaj flagoj, marŝis 2,000 talitamburistoj kaj cimbalistoj ĉe la kapo de la kolosa paradantaro en la grandan placon antaŭ la Pordego Tien-an. La ritmo de la batoj diktis la klarajn, firmajn movojn de la ludantoj. Iliaj paŝoj kaj batoj estis simplaj, tamen la giganteco de la nombro kaj la perfekta akordiĝo de la movo kun la sono estis treege impresa, kiel la senfina ondiga maro.

La talitamburo estas tipe ĉina nacia instrumento. Ĝi estis priskribita unuafoje en la kroniko de la kvara jarcento P.K. En la frua printempo kiam la kamparanoj laboris sur la kampoj, ili kutimis kanti kaj labori laŭ la bato de granda tamburo. Pli poste, kiam unu vilaĝo iris por saluti alian dum la Printempa Festo, ili marŝis laŭ la bato de malgranda talitamburo. Dum pli ol mil jaroj, la talitamburo ĝuis tutlandan popularecon.

En suda Ĉinio la popolo nomas ĝin la Flora Tamburo. Kiel en antikvaj tagoj ĝi estas ankoraŭ ludata en la novjaraj procesioj. Teamoj de ludantoj batantaj siajn talitamburojn rondiras de vilaĝo al vilaĝo. Milde kantas la knabino dum recitkantas viroj aŭ maljunulinoj versparojn de bondeziroj. Aŭ iu virtuozo elmontras sian artleritecon, batante kvar tamburojn samtempe, du per siaj piedoj kaj du per manoj. Li jen saltas, jen dancas, jen mansvingas, sed ĉiam tenas la ritmon.

La norda tambur-ludo diferencas malmulte en ritmo, sed multe en sia maniero de prezentado. La fama

Tali-

komponisto Lu Ĉi, kiu studis detale la nordan talitamburon, konkludis ke tradicie ĝi havis du difinitajn stilojn: "la ĝentila stilo" kaj "heroea stilo." La unua akompanis dancojn kun viglaj, delikataj movoj; la lasta enkondukis energiajn, militajn movojn, kun multaj eksaltoj. Tamen la teamo entute pli esprimis la heroecon de la laboranta popolo ol tiun de la batalantoj. Ili surprenis densajn brovojn kaj rozruĝajn vangojn kaj sin vestis en brilaj kolorplenaj kostumoj. Ili nombrigiĝis de ses ĝis dek anoj, kaj eble inkludis la sekvantajn: ĉefa granda tamburo—talitamburo—pajaco alvestita kiel virino—alia talitamburo—junulino—vilaĝa heroo—malbelega amazono—kaj Simio Sun Vu-kung (heroo de fama fantazia aventurkonto verkita en la Ming Dinastio) sekvata de la lasta tamburo.

La kamparanoj en Ŝansi, provinco fama por la talitamburo, parolas pri tiu danco jene: "La virino devas balanciĝi kiel printempa saliko kaj la viro salti kiel tigro."

Rilate al la batoj de la tamburo, preskaŭ troviĝas nenia malsimileco inter la norda kaj la suda. La tamburo estas portata ĉe la maldekstra



Nodo Malligita

La aŭtoro naskiĝis en 1922 en iu vilaĝo en meza Sŝansi-Provinco. Post kiam eksplodis la Kontraŭ-Japania Milito en 1937, li aliĝis al kontraŭ-japania gerilo. Komence li estis simpla ano, poste fariĝis subpelotonestro kaj pli poste propagandanto. En la printempo de 1942 li iris studi en la Jen-ana Armea Art-lernejo. Post du jaroj li revenis al la Sŝansi-Sujjuan-limregiono por fari lokajn laborojn kaj samtempe servis kiel korespondanto de ĵurnalo. Poste li denove estis sendita al populara ĵurnalo de kamparanoj Sŝansi-Sujjuana Amasa Ĵurnalo kaj laboris tie kiel redaktoro, intervjuisto kaj poste ĉefredaktoro. Nun li studas en la Centra Literatura Instituto.

Kiam li aliĝis al la revolucia armeo, li ankoraŭ ne finis sian elementan edukon. Tamen sub la eduko de la revolucia armeo kaj meze de la arda amasbatalo, dank'al helpo de kamaradoj kaj sia propra peno, li multe progresis diversflanke, precipe politike kaj idee.

Li komencis lerni verkadon, kiam li laboris kiel korespondanto de ĵurnalo. Komence li skribis nur iom da simplaj novaĵoj. Pro daŭra verkado kaj konstantaj helpo kaj kurajigo de la ĵurnalejo, li povis iom post iom raporti pri pli gravaj problemoj. Poste li provis verki rakontojn kaj novelojn. Per tia pacienca lernado en praktiko li fariĝis ĵuna verkisto por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Eldoniĝis el liaj verkoj jam la jenaj: "Herooj de Ljuliang-montaro" —romano verkita kune kun Ŝijung, "Vilaĝa Malamikeco," "Malnobla Virino" kaj "Pelotono de Coŭ Teruras ĉe Pingĉuan" —kolektoj de noveloj, kaj "Trezoza Lagenario"—kolekto de popolaj legendoj. Jena novelo estas el "Vilaĝa Malamikeco."

I

Ekde la reveno de la printempo, ĉiu el la kulturistoj en la vilaĝo okupis sin je la serĉado de kunulo por interhelpa laboro. Post la agrara reformo, la fervoro por produktado ja ege kreskis kompare kun tiu en pasintaj jaroj.

Liu Da-ĵou (劉大有) kaj la maljuna Li Er-niu (李二牛) ankaŭ konsiliĝis inter si formi interhelpan grupeton.

"Ekzistas neniu alia pli ideala paro da kunuloj por interhelpa laboro ol vi!" rimarkis Li Ho-ho (李和和), la prezidanto de la Kamparana Asocio. Konsentis ĉiuj vilaĝanoj: "Ilia interhelpa laboro certe prosperos!" Ankaŭ ili mem diris entuziasme: "Ni kunlaboras memvole, kaj neniu el ni devigis la alian."

Li Er-niu estis malnova mezkamparano. Li kulturis malpli ol tridek muojn! da tero. Antaŭe li posedis bovon kaj azenon. Sed la bovo mortis en la pasinta vintro kaj nun restis al li nur la azeno. Liu Da-ĵou estis nove liberigita terkulturisto. En la agrara reformo li ricevis azenon kaj dudek kvin muojn da tero. Ili havis proksimume egalan kvanton da tero kaj laborforto. Ili loĝis en sama korto kaj interrilatis tolereble bone. Efektive ne ekzistis pli konvena paro da kunuloj ol ili por interhelpa laboro.

Sed nenio estas certigebla. Tia ideala interhelpa grupeto subite—surdulo ludas fajrkrakojn²⁾—disiĝis, antaŭ ol dek tagoj pasis.

Tio okazis tre mirige. En la mateno de tiu tago, Liu Da-ĵou estis en la korto kolektanta la lignokarbon, kiun li hejmen portis la pasintan tagon. Li Er-niu venis el sia domo kaj diris streĉante sian zonan ĉirkaŭ la korpo: "Hodiaŭ ni semu printempan tritikon en miaj tri muoj da tero."

"Bone, mi semos por vi," respondis Liu Da-ĵou.

Sed kiam Li Er-niu iris al la trogo de la brutoj kaj esploris, lia mieno subite ŝanĝiĝis, ekturnis al Liu Da-ĵou kaj diris malbonhumore: "Malbenite! Kia interhelpo! tion mi ne plu volas, de nun ni ĉiu zorgu pri sia propra afero!"

Liu Da-ĵou longe konfuziĝis ne sciante kio okazis. Li vidis, ke Li Er-niu surŝultrigis la plugilon kaj semujon, kaj foriris kun sia azeno eĉ sen rerigardo malantaŭen.

Nun grumblis ankaŭ Liu Da-ĵou: "Al la diablo! Ĉesu interhelpi kiel plaĉas al vi! Ĉu mi elprofitos ion el la interhelpado? Miaj kampoj ne dezertiĝos sen via kunlaboro!"

II

En tiu antaŭtagmezo, Li Ho-ho, la prezidanto de la Kamparana Asocio, okupis sin je plenigado de longa kavaĵo, kiun kaŭzis forlavado en la pasinta jaro. La tasko finiĝis antaŭ tagmezo. Li iris hejmen kun la ŝovellilo sur la ŝultro. Li ekvidis de malproksime, ke Li Er-niu plugas unuope kun sia azeno. Li pelis la bruton ĝis la norda ekstremo, restiĝis ĝin sur la loko kaj reiris al la suda ekstremo kun malplenaj manoj. Tiam li levis la korbon kaj prisemis laŭ la sulko. Kiam li atingis la nordan limon, li formetis la korbon, ekprenis la vipon kaj pelis la azenon suden... Li Ho-ho rigardis kun mirego. Li alpaŝis rapideme kaj demandis:

"Oĉjoĵ Er-niu, kial vi semas unuope?"

Li Er-niu nur hm-is anstataŭ respondi.

"Kie estas Liu Da-ĵou?" denove demandis Li Ho-ho. Li Er-niu turnis la kapon flanken kaj diris: "Mi ne scias."

Li Ho-ho legis ion malbonhumoran en lia respondo, kaj ekkomprenis, ke problemo naskiĝis inter ili, sed ne scias kie kuŝas la kaŭzo. Li konis la azenan obstinon de Li Er-niu. Tiu lasta, se li iam estis malkontenta pri iu ajn, neniam esprimis sian opinion, sed ĉiam enteriĝis ĝin en la koro. Se pridemandita rekte, li eldiris eĉ nenium vorton dum tri tagoj kaj tri noktoj. Do Li Ho-ho diris nenion alian kaj simple proponis: "Oĉjo Er-niu, mi vin helpu!" Li Er-niu daŭrigis la plugadon, dirante nek jes, nek ne. Ne atendante respondon, Li Ho-ho starigis sian ŝovellilon ĉe la kamplimo, levis la semkorbon kaj semadis postirante. Ili ambaŭ diris nenion.

Post iom da laboro, Li Er-niu ripozis dirante: "Havu pipon da tabako!" Li Ho-ho formetis la korbon kaj elprenis sian pipon. Ili sidis sur la tero, frapis silikon por bruligi la tabakon. Li Ho-ho parolis fumante:

"Kiel maloportune estas kaj plugi kaj semi unuope! Vi kunlaboris tre bone. Kial ekĉesis interhelpi?"

"Kompreneble ĉar estas neeble plu daŭrigi! Se la interhelpo estus ebla, kiu ja rifuzis interhelpi!" diris Li Er-niu.

"Sed mi pensas, ke Liu Da-ĵou ne estas profitema egoisto; li estas tre honesta home," diris Li Ho-ho.

"La demando ne estas, ĉu li estas bona homo aŭ ne," diris Li Er-niu. "La ĉefa punkto estas, ke se la interhelpa grupeto daŭrus, mia azeno baldaŭ mortus."

"Kiel?" Li Ho-ho demandis kun scivolemo.

"Kiel?" ripetis Li Er-niu. "Li ne zorgas pri la bruto! Fakte li scias nenion. Li ĉiam pleniĝis la trogon per fojno antaŭ enlitiĝo kaj dum la nokto, ne plu zorgis ĉu ĝi manĝas aŭ ne. Nun imagu! Ĉu estas pli agrable manĝi trifoje ĉiutage aŭ unufoje supermezure. Cetere, li neniam elkrivis la sablerojn en la fojno. Tion vidante, mi tre dezirus jeti plenmanon da sablo en lian manĝelveton, ke li gustumu, ĉu la manĝo estas pli bongusta kun la sablo, aŭ sen la sablo."

"Vi diris la veron," konsentis Li Ho-ho kun rideto.

Vidante, ke Li Ho-ho konsentas kun li, Li Er-niu daŭrigis:

"La bruton li ne lasis ruliĝi sur la tero kaj iom ripozi post la laboro, sed tuj ligis ĉe la trogo. Dum la plugado, li ĉiam trovis ĝin iranta tro malrapide kaj vipis senkompatate. Ĉu ĝi ne sentas doloron? La bruto ja ne povas paroli, se ĝi scipovus paroli, ĝi jam antaŭ longe procesus kontraŭ li en la juĝejo!"

Li Er-niu diris tion ĉi kun serioza mieno, sed Li Ho-ho apenaŭ detenis sin de ridi. Li demandis post paŭzeto:

"Ĉu li tiel traktis nur vian azenon aŭ ankaŭ la sian?"

"Ĉies bruton li traktas tian. Sed mi ne povas toleri. Antaŭe mi detenis min de envortigo de mia malkontenteco kaj nur ĉagrenis en sekreto, ĉar mi timis, ke naskiĝus inter ni miskompreno, sed hodiaŭ mi ne povis plu toleri. Hieraŭ li pelis la du azenojn por porti lignokarbon, sed li eĉ ne scipovus kiel arangi la pakselon kaj la dorso de la azenoj tute frotvundiĝis!" Parolante li starigis por montri al Li Ho-ho la vundojn sur la azena dorso, kaj aldonis: "Dum mi kunlaboris kun li ok aŭ naŭ tagojn, mia azeno perdis almenaŭ dek ĝin-ojn (5 kg.) da graso."

"Ĉu ekzistas aliaj malfacilaĵoj inter vi?" demandis Li Ho-ho.

"Aliaj ne ekzistas. Sed mi jam decidis ne plu kunlabori kun li. Se la interhelpado daŭrus pli longe, mi perdos mian tutan kapitalon."

Li Ho-ho enmemorigis kion li aŭdis, sed dumtempe li diris nenion kaj helpis liu semi ĝis tagmezo.

III

Posttagmeze, Li Ho-ho ne iris al la kampo, li volis paroli kun Liu Da-ĵou. Kiam li alproksimiĝis al lia domo, tiu lasta estis kirlanta kotkaĉon por ŝmiri la postan muron.

"Kial vi ne iras al la kampo, sed okupas vin per tia neurga tasko?" demandis Li Ho-ho.

"Antaŭtagmeze mi kuris tra la tuta vilaĝo, sed plugilon mi neniel sukcesis pruntepreni!" diris Liu Da-ĵou.

"Kial vi ĉesis interhelpi kun Li Er-niu?" demandis Li Ho-ho.

Aŭdante, ke li demandas pri la interhelpa laboro, Liu Da-ĵou forlasis sian taskon, kaŭriĝis kaj diris kun ĉagreno kvazaŭ maljuste traktita: "Ĉu estas mia kulpo, se oni rifuzis kunlabori?"

Li Ho-ho ankaŭ kaŭriĝis kaj demandis: "Ĉu vi scias la kaŭzon?"

Liu Da-ĵou disetendis siajn manojn kaj diris: "Mi ja ne enpenetris en lian kapon, kiel mi povas legi liajn kaŝitajn pensojn? Hodiaŭ matene ni interkonsentiĝis amikece, ke ni semos unu printempan tritikon en lia kampo, sed post momento li ekdiris: 'Malbenite! Kia interhelpo! Mi ne plu volas, de nun ĉiu el ni zorgu pri sia propra afero!' Antaŭtagmeze kiam li revenis de la kampo, li ne plu ligis sian azenon ĉe la sama trogo kun la mia. Ĉis nun mi ankoraŭ restas konfuzita!" Li daŭrigis post paŭzeto: "Vi ĉiam diris en la kunveno, ke ni estas komunistoj, ni devas labori unuaj kaj ĝui lastaj, ni devas preni sur nin la malfacilaĵojn kaj ne estu profitemaj. Hodiaŭ mi meditis la tutan antaŭtagmezon. Mi kunlaboris kun li jam ok aŭ naŭ tagojn, sed mi neniam intencis profiti je lia kosto. Ĉar li estas maljuna kaj familiano de armeano³⁾ mi ĉiam



"Malbenite! Kia interhelpo! Tion mi ne plu volas..."



"Pravas la proverbo: Kiam manĝas iuj, tiam manĝas ĉiuj!"

prenis sur min la taskon zorgi la brutojn kaj elektis la pli pezajn laborojn dum kulturado, kaj ĉiam laboris unue sur lia tero. Mi ja ne scias en kio mi ofendis lin!" Tion findirinte li klinis la kapen kaj, verŝajne, lia koro estis plena de plendindaĵoj.

"Ĉion ĉi tion ankaŭ mi scias. Nu, ĉu vi iam bredis ŝarĝbrutojn?" diris Li Ho-ho.

Liu Da-ĵou, trovante la demandon iom stranga, diris tuj sekve: "Frato⁴⁾, kial vi demandas pri tio? Vi ja bone konas mian pasintecon. Ekde mia infanaĝo, mi ĉiam estis taglaboristo kaj paŝtis ŝafojn por aliaj, kiam povus mi bredi ŝarĝbrutojn?"

"Ĉu vi scipovas ilin nutri?" diris Li Ho-ho. "Sed tio ja ne estas malfacila laboro. Kiu ne scipovas ilin nutri? Se oni neniam manĝis porkaĵon, almenaŭ vidis porkon kuranta⁵⁾!" respondis Liu Da-ĵou.

Li Ho-ho diris kun manklako: "Ĝuste ĉi tio estas via manko." Li tuj rakontis al li la opinion de Li Er-niu kaj aldonis: "Ni, komunistoj, devas ĉiam kaj ĉie lerni de la aliaj. Koncerne brutobredon kaj terkulturon, Li Er-niu havas kelkdeklarajn sperton, li estas multe pli kompetenta ol vi, tial vi devas peti lian konsilon de tempo al tempo."

Aŭdinte tion, Liu Da-ĵou ekkomprenis kaj tuj diris: "Ĉu tio estas la kaŭzo! En tiu kazo, verdire, tio ja estas mia manko. Li Er-niu amas siajn brutojn. Lastjare lia bovo malsaniĝis, la tutan nokton li flegis ĝin en la stalo, kaj ploris multajn tagojn kiam ĝi mortis."

"Tiu problemo estas facile solvebla laŭ mia opinio," diris Li Ho-ho. "Hodiaŭ vespere ni havu kunveneton. Tie vi faru memkritikon kaj la interhelpa grupeto restariĝu. Cerbumu, kiajn aliajn mankojn vi havas, kaj kiajn bonajn kvalitojn havas li."

"Konsentite! Estu trankvila, tion mi povas fari!" diris Liu Da-ĵou.

IV

Tiun vesperon, dum la tempo de vespermanĝo, Li Ho-ho promenis kun mangpelveo al la korto de Li Er-niu kaj vidis ke tiu lasta estas ankaŭ manganta.

"Oĉjo Er-niu, ĉu la printempa tritiko estas finsemita?" demandis Li Ho-ho.

"Ne," respondis Li Er-niu, "Restas ankoraŭ pli ol unu muo nesemita."

Li Er-niu etendis al li benketon dum li parolis. Liu Da-ĵou aŭdis, ke oni babildas en la korto kaj ankaŭ elvenis kun sia mangpelveo dirante: "Pravas la proverbo: Kiam manĝas iuj, tiam manĝas ĉiuj!"

Li Er-niu tenis silenton kaj manĝis rizkaĉon klinigante. Ne atentante tion Liu Da-ĵou prenis benketon kaj sidigis.

Ekvidante la situacion, Li Er-niu diris: "Kio? Jen oni kunvokas akuzkunvenon kontraŭ mi? Nu, akuzu, mi jam decidis ne plu kunlabori, kiel ajn vi argumentos."

"Vidu, kiel absurde vi parolis!" diris Li Ho-ho ridante. "Ĉu oni povas kunvoki akuzkunvenon por tia afero? Interhelpa grupeto bazigas sur memvolo. Neniu rajtas devigi la alian. Se la interhelpa grupeto fiaskis, tio estas mia kulpo, ĉar mi gvidis malĝuste kaj ne povis helpi vin solvi la problemojn."

Liu Da-ĵou sekvis: "Se nia interhelpa grupeto malprosperis, ne estas vi, kiu kulpis!"

Li Er-niu klinigis kaj eligis laŭtan ŝmacon dum la mangado de rizkaĉo, por montri, ke li ne volas aŭskulti.

Liu Da-ĵou daŭrigis ne atentante lian sintenon: "Ĉio estis mia kulpo. Ekde infanaĝo mi paŝtis ŝafojn kiel taglaboristo. Terkulturo kaj bredo de ŝarĝbrutoj estis fremdaj por mi. Oĉjo Er-niu, vi estas malnova terkulturisto. Vi havas riĉan sperton en tiuj fakoj. Havante tian bonegan instruiston antaŭ mi, mi ne sciis peti de vi konsilojn, sed fuŝadis ĉion laŭ mia kaprico. La fojnon mi tranĉis en tre longajn pecojn kaj mangigis la brutojn per fojno kun sableroj. Mi ne tegis diligente la plankon de la stalo per freŝa tero. Kiam la plugilo malĝustigis dum la plugado, mi ne kulpigis mian propran mallertecon sed ĉiam vipis la bruton."

Li Er-niu haltigis sian manon, kiu tenis la rizpelveon, karesis la barbon per alia kaj aŭskultis silente. La virinoj de ambaŭ familioj ankaŭ alpaŝis iom post iom.

"Prenu la hieraŭan okazaĵon de karboportado kiel ekzemplon," daŭrigis Liu Da-ĵou. "Mi ja ne scipovis arangi la pakselon, tamen mi ne petis la konsilon de Oĉjo Er-niu, timante, ke li dirus: 'Estante terkulturisto, vi eĉ ne scias kiel arangi la pakselon!' sed faris ĉion fuŝe. Fine je la reveno de la veturado la spino de la azenoj tute frotvundiĝis, kaj tio incitis la koleron de Oĉjo Er-niu. Lia kolero estis tute justa. Ni komprenu alies koron per sia propra! Ĉiu kolerus en tia okazo!"

Li Er-niu intencis teni silenton, sed li aŭdis ke Liu Da-ĵou parolas tre sincere, kaj memoris, ke li ĉiam laboris honeste kaj lia sola kulpo estas trakti la brutojn tro balbone. Eĉ tion li ne faris intence, ĉar li efektive tion ne scipovas. Kaj li memoris, ke li mem ankaŭ havas kulpon, ĉar li klarigis al li neniam. Nun oni prenis ĉion sur sin, li sentis iom da bedaŭro. Li diris pretrevole: "Ankaŭ mi estas kulpa!"

"Juĝite laŭ tio, kion mi ĵus aŭdis, Da-ĵou estas la pli kulpa!" diris Li Ho-ho, "ĉar li ne nur ne scipovas, sed ankaŭ ne bone lernis."

La edzino de Liu Da-ĵou interrompis: "Nia hejmo estas nove fondita. Ni ĉie bezonas konsilojn kaj helpojn de aliaj. Ekzemple, dum ni loĝas en tiu korto, kiujn el la potoj, vazoj, pelvoj, tasoj ne prunte-donis Onjo Er-niu?"

"Bofratino Liu, kion vi parolas!" respondis Onjo Er-niu. Kiel la proverbo diras: 'Proksima najbaro estas pli valora ol malproksima parenco.' Ĉu ni ne multe ŝuldas al vi? Se estas necese reguligi la kontojn inter ni, la laborkosto superus nian pagvovon!"

"Estas ni, kiuj ŝuldas al vi pli multe," diris Liu Da-ĵou. Ĉesinte interhelpi kun Oĉjo Er-niu, mi nenie povis pruntepreni plugilon dum tuta tago."

Lin interrompis Li Er-niu: "Ankaŭ mi restis senhelpa hodiaŭ! Zorgante pri tio ĉi, mi preterlasis alion. Antaŭe ni duope prisemis 4-5 muojn dum unu tago, hodiaŭ mi ne finis eĉ du muojn malgraŭ la provizora helpo de Ho-ho."

"Ĉu vi kverelis hodiaŭ?" diris lia edzino. "Mi ja miris, kial mia maljunulo iras kun tordita buŝaĉo dum la tuta tago!"

Liu Da-loŭ diris: "Tio ne estis kverelo. Ĉefe kulpis..."

Li Er-niu interrompis: "Ĉefe kulpis mia fi-temperamento. Da-ĵou ne estas tia profitema au laborevita ruzulo. Dum la terkulturado, li ĉiam cedis la favoran kondiĉon al mi. La ĉefa punkte kuŝas en la zorgado kaj manipulado pri la brutoj. Se la bruton..." Li stariĝis parolante kaj iris al la stalo. Li karesis iomete sian azenon kaj tiun de Laŭ Da-ĵou kaj daŭrigis: "Se vi ne bone zorgas la bruton, ĝi ne povos bone labori por vi. En nia korto iam loĝis trupo. La kamaradoj kutimis diri, ke la pafilo estas ilia dua vivo. Nun la bruto estas la dua vivo de la terkulturisto. Ĝi ne scipovas paroli. Ĝi ne povas eldiri, kiam ĝi malsatas, soifas aŭ doloras. Ĉio dependas de via zorga observo, kian havas virino vartanta sian infanon. Kiom la bruto laborgajnas ĉiujare por ni? Ni ne povas trakti ĝin tiel malbone kiel la terposedantoj traktas siajn laboristojn."

Liu Da-ĵou kaj Li Ho-ho ambaŭ diris kapjese: "Tio estas pura vero."

"Antaŭe mi ne konis tiun ĉi veron kaj kredis, ke sufiĉas ĝin satmanĝigi tiel, ke ĝi estu taŭga por la servo." Aldonis Liu Da-ĵou.

Li Er-niu diris: "Mi konas mian malbalnan temperamento. Nun demokratio estas en modo. Se vi havas opinion kontraŭ mi ankaŭ eldiru!"

"Vi traktas homojn bonkore," diris Li Ho-ho. "Sed vi neniam eldiras vian opinion kontraŭ iu ajn, vi ĉiam kaŝas ĝin en la koro. Kiam vi ne povas plu toleri, vi eksplodas de furiozo, ke oni ne povas elporti. Vi devas ĉiam eldiri vian opinion. Se vi trovas ion malĝusta, kritikitu mal-kaŝe."

Diris ankaŭ Onjo Er-niu: "Kiam li koleras kontraŭ ni, li same tiel kondukas kaj mienas timige. Neniu divenas la kialon. Li ne diras eĉ unu vorton malgraŭ ĉiuj demandoj. Vere stranga estas lia temperamento."

Li Er-niu diris ridante: "Hehehe, jen estas mia manko. Mi devas min plibonigi."

Vidante, ke la nodo estas malligita kaj ne ekzistas plu problemo por la interhelpa grupeto, Li Ho-ho ekstaris kaj diris oscedante: "Estas tempo por dormi. Morgaŭ ni iru frue al la kampo!"

"Grandan bonon portis la hodiaŭa kunveno," diris Li Er-niu.

"Mi venis ne por partopreni kunvenon, sed nur iom babili kun vi," diris Li Ho-ho.

"Hehehe," ridis Li Er-niu. "Nun vi kadroj inventas ĉiujn rimedojn por instigi ĉiujn bone interhelpi sin en la produktado. Kaj ankaŭ tio ĉi estas kunveno!"

Lia parolo ridigis ĉiujn.

V

Noktomeze, kiam Li Er-niu ellitigis por mangi la brutojn, li vidis, ke Liu Da-ĵou sensabligras la fojnon per kribriilo antaŭ trogo de lia azeno. Li eksentis korvarmon, alpaŝis kaj ĵetis al ĝi rigardon dirante: "Morgaŭ prisemu unue viajn tri muojn per pizo kaj poste semu mian restantan iomon de printempa tritiko!"

tradukis S. J.



"Morgaŭ prisemu unue viajn tri muojn per pizo..."

per pizo kaj poste semu mian restantan iomon de printempa tritiko!"

- 1) Muo: ĉina mezurunuo, egalas al 6.14 aroj.
- 2) Populara sprita diro signifanta "disiĝi," ĉar surdulo ne povas aŭdi la eksplodon de fajrkrakajo sed nur vidas ke ĝi "disiĝas."
- 3) Por montri sian dankemon al la batalantoj de la Popola Liberiga Armeo kaj al la ĉinaj volontuloj en Koreio, la ĉinoj volonte honoras kaj donas helpojn al la familianoj de la batalantoj.
- 4) Oĉjo, onjo, frato kaj bofratino: ĝeneralaj salutonoj por viroj kaj virinoj respektive.
- 5) Populara diro signifanta: kvankam mi mem ne tion faris, tamen mi vidis aliajn tion fari.



LITERATURAJ Kolektoj de la Famaj Ĉinaj verkistoj kompitaj de aparta komitato sub gvido de Ministerio de Kulturaj Aferoj de la Centra Popola Registaro nun eldoniĝas unu post la alia de Kajming-Librojo (開明書店). En tiu ĉi serio de literaturaj kolektoj elektigis realismaj verkoj de modernaj verkistoj de post la "4-maja" movado. Ĝi celas ke la legantoj povu en mallonga tempo kaj per minimuma energio akiri fundamentan konon pri la progreso de ĉina literaturo. La tuta serio dividiĝis en du partojn inkluzivante la verkojn de 24 verkistoj. En la unua parto troviĝas kolektoj de Ŝju Tis-an (許地山), Joŭ-sih (柔石), Hu Je-pin (胡也頻), Jen-fu (殷夫), Hung Ling-fej (洪靈菲), Ven Jituo (聞一多), Aj Ĉing (艾青), Bakin (巴金), Hung Sen (洪深), Vang Lu-ŝen (王魯彥) Ĉu Zih-ĉing (朱自清) kaj Ĉau Su-li (趙樹理), kaj kolektoj de ĉi tiuj verkistoj jam eldoniĝis. Tiuj de Ĉiang Kuang-ĉih (蔣光慈), Je Ŝeng-tau (葉聖陶) kaj Ĉang Tian-ŝi (張天翼) en la dua parto ankaŭ eldoniĝis lastatampe. La ceteraj ilin sekvos tuj baldaŭ.

QAGJURNALO en Ĉinghaj-Provinco (青海省) eldonita en Tibeta lingvo nun ricevas grandan subtenon de la mongola kaj Tibeta popoloj. Tiu ĉi ĵurnalo deponis sia eldoniĝo en januaro en la kuranta jaro multon faris por klarigi al la mongola kaj Tibeta popoloj pri la Komuna Programo, pri la movado kontraŭ-usona kaj por-korea, kaj pri la subpremo al la antirevoluciaj agentoj. Krome ĝi gvidas la lokan laboron, respegulas la novan vivon de la liberigitaj mongoloj kaj tibetanoj kaj kuraĝigas ilin al konstruado de nova Ĉinghaj-Provinco. Tio estas tute senprecedenca por la mongoloj kaj tibetanoj en Ĉinghaj-Provinco. Antaŭe la reakciaj reĝimoj ĉiam subpremis kaj limigis la progreson de la fraternaĵaj kulturoj. Ili forprenis de la frataj nacioj la rajton uzi sian propran lingvon por esprimi siajn opiniojn. Tiam la mongoloj kaj tibetanoj en Ĉinghaj-Provinco ne nur neniam vidis tagĵurnalon presitan en ilia lingvo, sed eĉ lerno de sia propra lingvo estis malpermesata. Nun multaj el la tibetanoj mem iras al la gubernia registaro por peti tiun tagĵurnalon kaj ankaŭ en la lernejoj tiu ĵurnalo estas utiligata kiel legajo de la lernantoj.

POR unuiĝo de la tutlandaj sciencistoj, por akordiĝo inter sciencaj laboroj kaj nacia konstruado ekonomia, kultura kaj nacidefenda kaj interligiĝo de teorio kaj praktiko, societoj de naturaj sciencoj en Ĉinio unu post la aliaj nove fondiĝis aŭ reorganizigis sub la gvido kaj

helpo de la Tutĉinia Federacio de Natursciencistoj. Ĝis nun jam 19 tiaj societoj oficiale fondiĝis, 8 estas en organizado kaj 4 estas preparataj. Ekde la fino de julio la societoj jam bone organizitaj sinsekve okazigis kongresojn en Pekino. Inter ili troviĝis Ĉina Fizika Societo, Ĉina Botanika Societo, Ĉina Kemia Societo kaj Ĉina Medicina Societo. En ili la ĉinaj sciencistoj detale esploris problemojn en sciencaj studoj kaj difinis siajn direktojn kaj taskojn por la estontaj laboroj.

LA ŝtata Popol-literatura Eldonejo (人民文學出版社) nove fondita en marto ĉijare jam komencis eldoni novajn librojn. Ĝi estas gvidata de Ministerio de Kulturaj Aferoj kaj Eldona Administerio de la Centra Popola Registaro. Ĝin estras k-do Feng Ŝjue-feng (馮雪峯), fama verkisto en Ĉinio. La eldona plano ĉefe akcentas la literaturajn verkojn modernajn kaj poste la popularajn, klasikajn kaj eksterlandajn. Modernaj literaturaj verkoj estas eldonotaj en du serioj: la Popol-literatura Serio kaj la Literatur-konstrua Serio. Popularaj, klasikaj kaj eksterlandaj literaturaj verkoj estas plane eldonitaj. Krome ĝi planas ankaŭ eldoni plenajn kolektojn de la plej famaj verkistoj kiel k-do Kju Ĉiu-paj (瞿秋白) kaj s-ro Lu-sin (魯迅) kaj ankaŭ tiun de Marksism Gorki. Sub ĝia gvido nun eldoniĝas kvin literaturaj gazetoj, nome "Popola Literaturo" (人民文學), "Literaturo" (文藝報), "Literaturo de la Popola Libera Armeo" (解放軍文藝), "Noveloj kaj Ritmaj Rakontoj" (說唱唱) "Folkloro Gazeto" (民間文藝集刊). Laŭ la eldona plano en 1951 ĝi eldonos ĉirkaŭ 100 literaturajn verkojn, kaj ĉiu el ili nepre

Saluto el D.D.R. por la 30-jara Ĉina Kompartio

Tre estimataj samideanoj, karaj kunbatalantoj,

Antaŭ ĉio estu kore salutataj de via amiko en la Germana Demokrata Respubliko. Pardonu, ke mi tiom malfrue vin salutas okaze de la 30-jara fondiĝotago de la Komunista Partio de Ĉinio.

Kiel ano de "SED" (Socialista-Unueca Partio) mi prezentas al la heroo Komunista Partio de Ĉinio okaze de ĝia 30-jara datreveno fratajn salutojn! Dum 30 jaroj la Komunista Partio de Ĉinio heroo batalis kaj gvidis la tutan ĉinan popolon al glora venko, venkis la perfideman Ĉiang Kaj-ŝekon kun siaj armeoj, batis la kriman imperiismon for el la lando. Sub la gvido de granda Maŭ Ze-tung la Komunista Partio de Ĉinio alte levis la standardon de revolucio. Ĉi tiu partio de la laboranta klaso provis sin eltenema kaj nedetruibla en senombraj bataloj kontraŭ siaj diversaj malamikoj.

Ni festis la monaton de german-ĉina interamikceco. Ĉinaj delegacioj ĝojigis niajn korojn.

La amikeco inter niaj popoloj fariĝis intima. Nia partio, la avangardo de la germana labrista klaso, estas frate interligata kun via komunista partio. La Ĉina Komunista Partio donis grandan helpon al germana laborista klaso per siaj herooj agoj. La ĉina popolo nun venkis, ĉar

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligitaj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

- 1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.
- 2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.
- 3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

estos sub zorga kontrolo kaj en bela preso, ke tiuj verkoj estu aŭtentikaj kaj seneraraj ambaŭ enhave kaj forme.

DE la sepa ĝis la naŭa de aŭgusto en Ĉungking (重慶) okazis konferenco de la reprezentantoj de la literaturaj federacioj en Suda-Ocidenta Ĉinio. Ĝi estas kunvokita de la Prepara Komitato de la Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj en Suda-Ocidenta Ĉinio. En la konferenco oni unuanime opiniis, ke la ĉefa laboro de la literatura agado en la suda-okcidentaj provincoj devas esti la organizado kaj antaŭenpuŝo de verkado kaj per tio vigligi la tutan literaturan movadon. Samtempe ĉiuj konsentas, ke

literaturaj laborantoj devas profunde koni la vivon, pli-intensigi la lernadon kaj bone labori en la verkado kaj iliaj verkoj devas alpreni vivecajn kaj viglajn literaturajn formojn por ke ili povu esti facile akceptitaj de la popolamaso kaj doni al ili edukan signifon. Estis decidite, ke la literaturaj gazetoj redaktataj de tiuj federacioj devas ŝanĝi sian direkton al populareco kaj per literaturaj formoj familiaraj al la popolamaso, respeguli kaj gvidi la batalan vivon de la lokaj popoloj. Komuna literatura gazeto "Literaturo de Sud-okcidento" estos eldonata en oktobro por unuigi la literaturajn laborantojn en Suda-Ocidenta Ĉinio.

ĝi posedas tian partion, partion de la proletaro, partion de nova tipo dediĉita tutkore al servado al la ĉina popolo. Ĝi jam firme enradikiĝis inter la amasoj.

Kun batalema solidareco sekvas hodiaŭ ĉiuj pacamaj kaj progresemaj fortoj de la germana popolo la heroo batalon, kiun faras la ĉinaj volontuloj je la flanko de heroo Korea popolo kontraŭ la agresantaj imperiistoj. La heroo batalo de korea armeo kaj

bazon por la milito. Kiel ili rearmas en Malproksima Oriento Japanion tiel ili rearmas Okcidentan Germanion. Nia malamiko estas ankaŭ via malamiko, la sama, kiu militas en Korio, kaj la sama, kiu ankaŭ denove minacas la liberecon de Ĉinio.

La amikeco inter la germana kaj ĉina popoloj estas tial havanta eminentan signifon por la faligo de Usona militincitado por la firmigo de la paco.

Ni deziras al la glora Komunista Partio de Ĉinio kaj al tuta ĉina popolo plurajn sukcesojn por la konstruo de riĉa floranta kaj feliĉa Ĉinio, kiu estas grava parto de tutmonda pacfronto kaj kiu estas fidele ligata kun la granda Sovetio kun la patrino de la revolucio sub la gvidado de granda Stalin.

Vivu la amikeco inter la germana kaj la ĉina popoloj!

Vivu la komuna batalo en la tutmonda pacfronto kontraŭ la imperiista militpolitiko kaj por la paco!

Gloro kaj famo al heroo Komunista Partio de Ĉinio kiu gvidis la laboristan klason al venko!

Vivu la granda gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio kaj de la ĉina popolo, nia amiko Maŭ Ze-tung!

Kun mil bataloj de via germana amiko

Ehmig Erich
el D. D. R.



de ĉinaj volontuloj diras al ĉiuj pacamantaj popoloj ke la fortoj de paco, se ili aktive batalas, estas multe pli fortaj ol tiu de imperiistaj rabistoj.

Azio liberigis kaj neniu povos ĝin malhelpi.

La Usona-angla imperiismo ankaŭ preparas militon en Eŭropo kontraŭ la demokrataj ŝtatoj kaj Sovetio. Pri tio ili deziras fari el la tuta Germanio